

Andreas Emmerich prezidanto de GEA

Andreas Emmerich estis elektata prezidanto de Germana Esperanto-Asocio dum la Germana Esperanto-Kongreso 2001 en Ludwigshafen. Por la legantoj de *Esperanto aktuell* li donis intervjuon al la redaktoro Alfred Schubert.

Kiamaniere aspektas tute normala labortago de la prezidanto de la plej granda Esperanto-asocio en Germanio? Kion vi faris hodiaŭ?

La unua “punkto de tagordo” estis mia malgranda filino. Mi okupiĝis pri ŝi dum mia edzino faris prizorgojn. Poste mi aranĝis kelkajn malgrandajn aferojn en mia hejma oficejo – parte esperantaj kaj parte profesiaj.

Kion vi faras profesie?

Mi havas instituton, kie infanoj kaj junuloj, kiuj havas problemojn en la ŝtataj lernejoj, ricevas helpon per kromlecionoj.

Interesa laboro – rakontu pli pri via labortago.

Poste mi veturis al Michelstadt, kie situas unu de la kvar filioj de mia instituto. Mi mem gvidas tiun filion. Posttagmeze mi kontrolis la funkcion de la filio kaj parolis kun lernantoj, iliaj gepatroj kaj kun kelkaj instruistoj.

Ĉu vi ankaŭ mem instruas?

Jes. Mi ankaŭ mem instruas. Sed nur malofte – pro manko de tempo. Gvidi la entreprenon postulas vere sufiĉe da tempo.

Ĉu hodiaŭ estis normala tago? Aŭ ĉu morgaŭ estos tute alia?

Estis pli malpli normala tago. Morgaŭ mi unue faros kelkajn prizorgojn, kaj poste mi denove laboros en Michelstadt. Posttagmeze mi veturos al Bochum, kie postmorgaŭ okazos kunsido de kolegoj. Mi partoprenos kiel membro de la estraro de nia faka asocio.

Al tute alia temo: Kiamaniere vi eksciis pri Esperanto kaj kiam vi komencis lerni ĝin?

Mia instruisto pri la angla lingvo

informis min pri Esperanto kiam mi estis 15-jara. Li sciis, ke mi interesiĝas pri lingvoj, kaj donis al mi la unuan volumon de *Esperanto programita*. Li nur diris: “Jen, rigardu, tio povus esti interesa por vi.” Kaj la lingvo ne nur interesis min – ĝi fascinis min! Scivoleme mi komencis lerni.

Kaj kio sekvis? Kia estis via “esperanta kariero”?

Komence mi aktivis en la Esperanto-grupo de Darmstadt, kies prezidanto mi estis dum kelkaj jaroj. Niaj ĉefaj aranĝoj estis vojaĝoj al la ĝemelurboj de Darmstadt, plej ofte al Alkmaar (Nederlando) kaj Troyes (Francio).

Kompreneble mi gvidis kursojn kaj organizis la lokan klubon, do nenio speciala, simple la normala kluba vivo. Sed mi ankaŭ rememoras, ke ni iam surscenigis la teatraĵon “La arkitekto kaj imperiestro de Asirio” de Arrabal, fare de franca trupo. Tio estis certe kulmino de mia laboro en Darmstadt, pri kio mi ankoraŭ fieras.

Post mia foriro de Darmstadt mi aktivis malpli dum kelkaj jaroj, pro persojnaliaj kialoj – mi devis finstudi kaj komencis mian entreprenon.

Nur meze de la 90aj jaroj mi denove aktivis: Mi partoprenis la GEK en Freital apud Dresdeno en la jaro 1997. Mian unuan UK mi partoprenis en Montpeliero en 1998. Poste mi komencis miajn studojn pri interlingvistiko ĉe Ilona Koutny en Poznań.

Kiam vi partoprenis vian unuan aranĝon eksterlande?

Mia unua vojaĝo eksterlanden per Esperanto estis vojaĝo al Troyes, supozeble en la jaro 1983. Mi renkontis konatajn esperantistojn tie, inter ili Guy Dauphin, Maurice Merger, kiu jam antaŭ multaj jaroj mortis, kaj Eugène DeZilah.

Kion vi travivis en Esperantio? Ĉu estis neforgeseble belaj okazaĵoj?

La plimulto de tiuj aferoj devas resti sub la vualo de la diskreteco – finfine mi estas feliĉa edzo ... Mi nur volas menci, ke mi konatiĝis kun mia edzino per Esperanto. Tiun grandiozan okazaĵon Esperanto ebligis al mi.

Kion vi farus, se vi havus tute liberan jaron?

Facila demando. Nur eblas unu respondo: Mi ekirus al granda sencela vojaĝo tra la tuta Eŭropo.

Kaj kion vi dezirus, se la bona feino promesus al vi plenumi la tri dezirojn?

Nu bone: La konsilaj libroj de la serio „Kion fari, se la bona feino venas“ rekomendas unue peti saĝecon, ĉar tio estas la nura ebleco bone utiligi la duan kaj trian dezirojn. Sed mi simple dezirus: Daŭran sanecon por mia familio kaj mi dum la venontaj cent jaroj kaj daŭre plenan monujon. Tio certe sufiĉus. Kaj eble ankoraŭ unu aferon: Koni la tutan Esperanto-literaturon, tio estus bona!

Literaturo – kion vi momente legas?

Mi kontrollegas la Esperantan version de “La Mastro de la Ringoj” de Tolkien. Tio estas samtempe devo kaj plezuro, ĉar kvankam mi konas la romanon tre bone, ĉiufoje mi ĝuas ĝin.

Mia literatura intereso estas vasta kampo, kaj kompreneble mi legas ĉefe en la germana. Lastatempe mi legis plurajn ĉefverkojn de Henry Miller, ankaŭ “Neue Vahr Süd” de Sven Regner. En Esperanto antaŭ nelonge mi legis “La Ŝtona Urbo” de Anna Löwenstein. Tiu libro tre plaĉis al mi.

Vi certe ankaŭ ŝatas vojaĝi, se vi ne havas tute liberan jaron. Kien gvidos vin via venonta vogaĵo?

Nenio speciala. Mi intencas vogaĝi al la Provenco dum Pasko. Jam ofte mi estis tie, sed nun dum pluraj jaroj ne; kaj mia edzino ne konas tiun regionon, do mi volas montri ĝin al ŝi. Mi klopodas pasigi almenaŭ unu ferion en Francujo dum jaro, por ne perdi mian scipovon de la franca, por aĉeti vinon kaj por ĝui la kuirarton. Lastan paskon ni veturis ĝis la Bordoza regiono.

Finfine: Kion vi deziras al la legantoj de *Esperanto aktuell* por la nova jaro?

Malfacile – mi ja ne konas ĉiun personon! Do, la kutiman: Saĝecon, sanecon, feliĉon!

100 Jahre Esperanto-Gruppe Dresden

Die Esperanto-Gruppe Dresden hat Tradition in Dresden. Sie wird jetzt 100 Jahre alt. Schon vor 1906 gab es Esperanto-Aktivitäten in Dresden, jedoch führten erst die Vorträge von Dr. Schramm, dem Gruppengründer, im Oktober 1906 zur Gründung der Gesellschaft Esperanto-Dresden. Dresdner Esperanto-Freunde leisteten und leisten bis heute einen wichtigen Beitrag zu den Esperanto-Aktivitäten in Sachsen und in Deutschland. Eine bedeutende Esperanto-Sprecherin Dresdens war Marie Hankel, nach der eine Straße in Dresden benannt ist.

Esperanto ist eine leicht erlernbare internationale Sprache. Weltweit setzen sich die Esperanto-Vereine dafür ein, dass Esperanto als Zweitsprache für jeden die internationale Verständigung zwischen Menschen verschiedener Völker verbessert. Nur unterbrochen durch die Kriegszeiten und insbesondere durch die Zeit des Naziregimes setzt die Esperanto-Gruppe die völkerverständigende Arbeit bis heute fort. Hierzu gehört unter anderem die Kontaktpflege zu den Esperanto-Gruppen in Dresdens Partnerstädten, wie z. B. Breslau, Rotterdam, St. Petersburg, Straßburg und Florenz oder die Teilnahme an internationalen Kongressen. Dresden verfügt über Partnerstädte, die auch für die internationale Esperanto-Bewegung sehr wichtig sind. In Rotterdam befindet sich der Sitz des Esperanto-Weltbundes. In Florenz fand in diesem Jahr der 91. Esperanto-Weltkongress statt. Gäste aus dem Ausland, die Esperanto sprechen, führt man gerne durch Dresden und bietet ihnen kostenlose Übernachtungsmöglichkeiten wie bei Freunden. "In der letzten Zeit hat Esperanto durch die Nutzung des Internets wieder verstärkt an Popularität gewonnen", so Steffen Eitner, der für die Öffentlichkeitsarbeit des Sächsischen Landesverbandes zuständig ist.

Im Internet gibt es auch kostenlose Sprachkurse (<http://www.esperanto.de/dej/kursoj/>). Die Gruppe Dresden trifft sich regelmäßig im „Café Aha“. Weitere Infos per Mail an info@es

[esperanto-dresden.de](http://www.esperanto-dresden.de), Telefon: 0351 / 44 66 400 oder über die Internetseite <http://www.esperanto-dresden.de>.

Saksio regulaj renkontiĝoj

La Esperanto-grupo "Panoramo" (Halle) renkontiĝas je la 1a mardo de la monato, 18a horo en E.-Abderhalden-Str. 20; je la 3a mardo, 18a horo en Bölbergasse (restoracio "Zum Schwarzbrenner"), je la 4a mardo, 17a horo en PIKo.

La Esperanto-Gruppe Magdeburg renkontiĝas ĉiun 2an mardon (ne en julio, aŭgusto) je Steubenallee 2.

Esperanto-Klubo "Karapaco" en Zeitz: Dirk Bindmann, 03441-273251

walden@t-online.de

Altenburg: kaiser-altenburg@t-online.de, 03447-4012.

red.

Esperanto-Ligo Kurfürst

Por la jaro 2007 ni fiksas la tagojn de la kunvenoj jene:

20a de januaro, 17a de februaro, 17a de marto, 21a de aprilo, 12a de majo, 16a de junio, 21a de julio, 18a de aŭgusto, 15a de septembro, 20a de oktobro, 17a de novembro (ĉiam sabate je la 15a horo en la Jugendgästehaus im Alten Bahnhof en Ludwigshafen-Oggersheim, Prälast-Claire-Straße). La domo estas atingebla per trajno (Regionalbahn, ekveturo en Mannheim Hbf. 14.40, ekveturo en Ludwigshafen 14.50), per tramo (linio 4), per Rhein-Hardt-Bahn (ĝis la stacio Mannheimer Tor en Oggersheim, de tie aŭ per buso linio 166 aŭ piede (5 minutoj): kelkajn paŝojn direkte al la centro de Oggersheim, poste dekstren tra la Orangerie-Straße.

Antaŭ la domo ekzistas sufiĉe da spaco por parkado.

Mi ankaŭ volas informi vin pri la diservoj de Albrecht Kronenberger en Esperanto en la katedralo de Speyer: 25a de februaro, 29a de aprilo, 24a de junio, 30a de septembro, 25a de novembro (ĉiam je la 15a horo).

Bonvolu veni kaj kunpreni gastojn.

*Horst Kaufmann
vicprezidanto*

Esperanto-elsendo havas novan lokon

La Esperanto-elsendo der Radio Corax havas novan lokon. Jam ekde kelkaj monatoj la nekomerca radioprojekto „Radio Corax“ denove regule elsendas en kaj pri Esperanto. La nova loko estas la dua dimanĉo de ĉiu monato de la 11a ĝis la 12a horo. Ripetaĵo de tiu elsendo sekvas dek tagojn poste (merkredo) je la 17a horo.

La elsendo enhavas instrumentan muzikon kaj raportetojn pri la Esperantomondo, lingvopolitiko kaj etajn Esperantlingvaj konsilojn por turistoj. La nun eĉ dufojan elsendon ni dankas al niaj nelacigeblaj „radiologoj“ Achim Kaufhold kaj Udo Birkner.

Radio Corax estas ricevebla en la urbo Halle kaj la ĉirkaŭaĵo per la frekvenco 95,9 Mhz. La hejma paĝo estas www.radiocorax.de.

Tie vi trovas ligan al la programo kaj al la reta elsendado (livestream). Per la reto vi havas bonan kvaliton. Por ĉiu komputila sistemo ekzistas senkosta programo por aŭskulti retan radion. <http://212.122.41.133:8000/corax.ogg>

red.

Nürnberg regelmäßige Treffen

Die Esperanto-Gruppe Nürnberg trifft sich jeden vierten Donnerstag im Monat ab 18.30 Uhr in der Gaststätte „Platnersanlage“ zum Stammtisch. (Bucher Str. 67, Straßenbahn-/Bushaltestelle Friedrich-Ebert-Platz, Straßenbahnlinien 4 und 9 bzw. Buslinie 34)

Der Seniorentreff mit Esperanto-Konversation findet jeden zweiten Montag im Monat (außer an Feiertagen) von 15-17 Uhr statt (Cafeteria Heilig Geist, Spitalgasse 22).

Der Lern- und Sprechabend für Anfänger und Fortgeschrittene findet jeden dritten Donnerstag im Monat von 19-21 Uhr (außer an Feiertagen und in den Ferien) im Bürgerzentrum „Villa Leon“ statt (Philipp-Körber-Weg 1, Gruppenraum 1. Stock).

*Esperanto-Gruppe Nürnberg e.V.
Friesenstr. 24, 90441 Nürnberg
Tel. 0911/6604530, 0911/8017429
www.esperanto-nuernberg.de*

Esperanto-kurso en Innsbruck

Okazis ĉe la universitato de Innsbruck je la 21a ka la 22a de oktobro kurso pri la Internacia Lingvo sub la titolo "Esperanto. Eine Einführung". Ĝi estis enkonduko por studentoj de lingvistiko, instruis Herbert Mayer.

red.

laŭ informo de Leopold Patek

Simpatiaj gejunuloj el multaj landoj

Mi partoprenis, kiel gastino, la Esperanto-kursojn en la Universitato de Innsbruck. Mi tre ŝatis ilin. Mi estis tre ĝoja kaj ankaŭ surprizita, kiam mi vidis 30 gejunulojn simpatiajn el multaj landoj – ĉinajn, japanajn kaj ankaŭ italajn.

La afero entuziasmigis min. Gratulojn al la instruisto! La etoso estis vere bela. Dankon al la Universitato de Innsbruck, kiu ankaŭ donos diplomon al la partoprenantoj.

*Maria Lucchi
Trento/Trient
Italio*

Esperanto en Svislando

La oktobra agotago fariĝis en Svislando septembra agotagdeko. Sukcesa informado pri Esperanto, 15a ĝis 24a de septembro 2006 "Comptoir Suisse" estas la plej granda nacia foiro kiu okazas ĉiujare en Laŭzano. La temo de la ĉi-jara (87a) ekspozicio estis "Développement durable" (Daŭropova evoluo), la futuro de la planedo, kiu ricevis 280 000 vizitantojn el tuta Svislando.

Jen la unua fojo ke esperanta organizo estas inter la ekspoziciantoj: Svisa Esperanto-Societo ĉeestis en la speciala ekspozicio de la foiro: "C'est beau la vie ...?" (Ĉu belas la vivo ...?), kadre de la temo "komunikado".

La evento komenciĝis vendrede la 15an de septembro 2006. SES ricevis lokon en la parto de la ekspoziciejo kiu estis rezervita por societoj kunlaborantaj en la realigo de tiu speciala

projekto. Nia budo malgrandis sed ni estis la solaj kiuj havis deĵorantojn en tiu parto de la labirinto serpentuma vizitvojo.

Tiuj personoj, kiuj el la arego de preskaŭ tricentmil vizitantoj de la foiro decidis informiĝi pri la problemoj de nia tero, de ties loĝantaro kaj futuro, eniris la labirinton kun komputila identigilo enmane. Laŭvizite, ili devis decidi pri agoj, konduto tra sia vivo kies naskiĝlokon difinis hazarde la komputila ludo, pretigita far studentoj de la Universitato de Laŭzano. Survoje ili renkontis enmurajn ekranojn kiuj prezentis diversajn filmetojn ripetiĝintaj senhalte dum la tuta tago. Inter tiuj troviĝis, en angulo pri komunikado, filmeto prezentanta Esperanton. Antaŭ atingo de la elirejo, la ludanto-vizitanto povis renkonti niajn deĵorantojn ĉe la ekspoziciejo de informiloj, apud granda surmura afiŝo pri Esperanto kaj SES.

Elirinte, la vizitanto ricevis printitan diagramon kaj informojn pri la efikoj de siaj agoj al la tero kaj al ties loĝantaro dum la simulita vivperiodo. Estis tre bona decido partopreni tiun specialan ekspozicion, anstataŭ havi budon inter kaserolvendantoj kaj komercistoj de ĉiopova polvosuĉilo, ie en alia angulo de la grandega foiro. Tiel, ni ricevis la viziton de la bonaj personoj, tiuj kiuj estas mense malfermitaj kaj serioze interesiĝas pri la hodiaŭaj problemoj influantaj nian tre proksiman futuron. Meznombro inter 10 kaj 20 serioze interesiĝantaj personoj venis al ni tage por paroli pri Esperanto. Sed entute estis multe pli da vizitantoj kiuj almenaŭ ricevis informojn de kompetentuloj pri la Internacia Lingvo.

Laŭtparolile disaŭdigitaj diskutrondoj pri diversaj temoj, problemoj ligitaj al la daŭropova evoluo, same havis siajn alparolantojn esperantistajn: a) per la ĉeesto de Nicole Margot (redaktantino de "Etnismo"), en tiu pri tutmondigo kaj egaleco, b) per la kontribuo de Stefano Keller (sekretario de SES) en la debato pri interdependeco kaj pri ekapero de rifuĝintoj pro klimataj ŝanĝoj. La publiko de tiuj konversacioj povis ekscii pri la agadoj de esperantistoj en tiuj kaj najbaraj kampoj kaj konvinkiĝi pri la realeco kaj funkciado de la esperanta mondo.

La prelego, dum kiu Mireille Grosjean, kunprezidantino de SES, prezentis Esperanton pere de vortoludo, same altiris aŭskultantojn en la forumojn, ĉe la enirejo de la speciala ekspozicio.

Entute, oni povis observi ke iĝis afero tute natura kaj normala aŭdi aŭ paroli pri Esperanto en la foiro. Diversaj tekstoj, informiloj kun retligoj, unua leciono de perkoresponda kurso, la DVD Esperanto Elektronike, muzik-KD kaj esperantaj periodaĵoj estis donacitaj al interesiĝantoj.

Kontaktoj kreiĝis kun pluraj instruistoj, universitataj profesoroj, studentoj, gejunuloj kaj aliaj personoj el plej diversaj profesioj. Eĉ lokaj politikistoj haltis ĉe nia budo por pozitive interparoli pri Esperanto. Ekĝermis projektoj pri kunlaboro kun evoluhelpaj organizoj kiuj invitis nin al siaj kunvenoj por paroli pri Esperanto. Baldaŭ ni kunsidos kun studentoj de la altlernejoj EPFL kaj UNIL, por diskuti kunlaboron pri traduko de ilia informmaterialo. Unu el la profesoroj renkontitaj jam eklaboris kun ni pri projekto enkonduki instruadon de Esperanto en liaj instituto kaj kursoj altlernejaj.

En la spirito de interdependeco, la speciala ekspozicio estos prezentata ankaŭ en aliaj urboj, landoj por atentigi ankaŭ aliloke pri la neceso ŝanĝi nian konduton, por agi kune favore al la tero kaj al la tuta homaro. La respondeculoj de tiu projekto antaŭvidas eĉ ĉeeston de la speciala ekspozicio en venonta Universala Kongreso de Esperanto!

Prelegoj kaj ekspozicio pri indiĝenaj problemoj en Amazonio okazintaj samtempe kadre de la ĉi-jara "Comptoir", permesis al ni krei kontaktojn kun aktivuloj ankaŭ de tiu agadkampoj. La 10-taga evento, kiun ni vere povas taksi sukcesa, realiĝis dank' al kunlaboro de sindonemaj deĵorantoj: Charlotte Blanc Maillard el Vevey, Nancy Fontannaz, Nicole Margot kaj Stefano Keller el Laŭzano kaj Mireille Grosjean el Les Brenets. Dankon ankaŭ al aliaj esperantistoj kiuj nin kuraĝigi venis el Lucerno, Ĝenevo kaj Laŭzano.

Stefano Keller

kunordiganto de la projekto

Laŭzano, 27a de septembro 2006

Kial -i- por -land- estas kontraŭ-Fundamenta

En *Esperanto aktuell* 2/2006 (p. 9) aperis letero de leganto, kiu kritikas la redaktiston, ĉar tiu permesas „kontraŭ-Fundamentan“ uzon de -i- anstataŭ -uj- por -land-. La redaktisto en „Esperanto aktuell“ 4/2006 (p. 16) demandas publike, ĉu tiu kritiko estas prava, kaj mencias, ke la plejmulto de la legantoj preferas la derivaĵon per -i-. Sekve mi prezentas kelkajn rezonadojn pri tiu demando, grava ne nur por la lingvoteorio.

Sistema prisilento de -uj-

Unue provizora respondo al la demando, ĉu la uzo de -i- estas kontraŭ-Fundamenta. La Fundamento kompreneble permesas novajn formojn, eĉ paralelajn al jam ekzistantaj. Kontraŭ-Fundamenta estas tamen la malpermeso de iu lingvero el la Fundamento, kaj -uj- estas bona ekzemplo. Jam iuj asertas, ke -uj- estas arĥaismo, kaj pri tio Zamenhof skribis en la Antaŭparolo al la Fundamento:

„Sed, prezentante parton de la fundamento, tiuj ĉi arĥaismoj neniam estos elĵetitaj; sed ĉiam estos presataj en ĉiuj lernolibroj kaj vortaroj samtempe kun la formoj novaj, kaj tiamaniere ni havos la certecon, ke eĉ ĉe la plej granda perfektigado la unueco de Esperanto neniam estos rompata kaj neniu verko Esperanta eĉ el la plej frua tempo iam perdos sian valoron kaj kompreneblecon por la estontaj generacioj.“

Se do lernolibro, vortaro kaj alia presaĵo en Esperantujo sisteme prisilentas -uj-, ĝi kondukas kontraŭ-Fundamente. Ekzemploj estas la „jarlibro“ de Universala Esperanto-Asocio (UEA), ties revuo „esperanto“; plie la vortaroj de Franz Okelmann kaj la vortaro „Deutsch-Esperanto“ de Erich-Dieter Krause (en ties vortaro „Esperanto-Deutsch“ tamen reaperis la ujo-variantoj). Sendinte kontribuon al la UEA-revuo „esperanto“, mi spertis foje, ke ties redaktisto senindulge ŝanĝis ĉiujn miajn ujo-formojn al la io-paralelaĵoj. Mi do resumu provizore, ke la uzo de -i- ne estas kontraŭ-Fundamenta, la sistema ne-uzo de -uj- tamen jes. (Tio validas ne simetrie: la sistema ne-uzo de -i- ne estas kontraŭ-Fundamenta.)

(Mal)avantaĝoj de -i- kaj -uj-

Due mi nun mallonge menciis la lingvoteoriajn avantaĝojn de -i- kaj -uj-, kaj atentis, ke kutime la avantaĝo de unu formo samtempe estas malavan-

taĝo de la alia.

Avantaĝoj de -i-:

i1) Evitas la homonimecon kun -uj- = „vaz-“ (kaj kun la fakte arĥaika „-arb-“).

i2) Pli internacia (sed se oni kontrolas tiun argumenton laŭkvante, ĝi ne estas tre konvinka).

i3) Laŭdire „politike pli konforma“, ĉar ekz. en Germanujo ne nur loĝas (etnaj) Germanoj.

i4) Pli ofte uzata nuntempe (pro la influo de lernolibroj, vortaroj, revuoj, vidu supre).

i5) Pli facila, ĉar oni ne devas atenti, ĉu -i- apartenas al la vortradiko por la lando.

Avantaĝoj de -uj-:

uj1) Fundamenta formo.

uj2) Obeas al la Fundamenta strukturo de sufikso per sia formo VK(K).

(V=vokalo, K=konsonanto; sole estr-havas la formon VKKK)

uj3) Estas uzebla kiel memstara vorto konforme al la Esperanta lingvostukturo.

uj4) Evitas homonimecon kun pluraj morfemoj de Esperanto kaj kun (pseŭdo)afikso -i- (ekz. en biologio, Luksemburgio, germanio, io, ktp.).

uj5) Klare montras, ke la radikoj antaŭ ĝi nomas la landanon.

Nuna uzo kaj lingvoŝanĝiĝo

En la praktiko dum la lastaj jaroj pli kaj pli venkis -i- kontraŭ -uj-. La kaŭzoj laŭ mia opinio estas ĉefe jenaj. Unue punkto i3 supre: Pro tiu duba politika kialo (oni povas ja same diri: „En Germanio ne nur loĝas Germanoj“) estiĝis punkto i4. Kiel la lingvouzantoj konduku alimaniere, se lernolibroj kaj vortaroj prisilentas -uj-? Gravas tamen ankaŭ punkto i5: Lingvoŝanĝiĝo inklinas al pli leĝeraj formoj, eĉ se tiuj minacas la regulecon de la lingva strukturo! Tio validas ankaŭ por vaste parolata planlingvo.

-i- minacas la kernan strukturon

La ĝenerala uzo de -i- fakte minacas la kernan lingvan strukturon de Esperanto! Kaj sekve ĝi estas vere - nerekte - kontraŭ-Fundamenta. Kiel mi pruvu tiun (espereble) iom ŝokan aserton per faktoj?

Unue la ekskluziva uzo de -i- en landonomoj kaŭzis jam, ke tre multaj Esperantistoj ne plu regas la nomojn de la koncernaj landanoj. Pluraj praktikaj kaj sistemaj testoj, kiujn mi okazigis, pruvis la pravecon de tiu aserto. Ankaŭ antaŭ unu semajno mi aŭdis en internacia rondo de Esperantistaj faku-

loj(!) multajn tiajn erarojn, ekz. „Koreanoj“, „Vjetnamanoj“, ktp. (Ĝustas: „Koreoj“ kaj „Vjetnamoj“).

Due tiu ĉarma -i- havas interesan evoluon. Jam oni vidas, ke ĝi aflikas landonomojn kun ĝisnuna simpla vortfina -(land)o: „Nederio“ (anstataŭ „Nederland“), Meklenburgo (vortaroj de Krause) => Meklenburgio, ktp. Ĝi estas uzata plivastasence por esprimi ajnan lokan signifon: Nordio, ŝengenio, Horzonio, tenebrio ktp. Ĝi kuniĝas kun la pseŭdosufikso -i- en „filozofio“, „geografio“, k.a. kun la signifo „tereno“, „kampoj“, jam al figura senco „faktereno“ => „fako“. Simile ĝi estas intertempe uzata por aliaj derivaĵoj, deviantaj ĉiam pli de la origina signifo „lando“. Ekzemple: „tirano“ => „tiranio“. Resume: Ĝi estas survoje al (neregula) pseŭdoderivaĵo kun ajna signifo (sekve ĝi perdas entute konkretan signifon). Tio estas tipa naturalisma evoluo, rekte kontraŭ la ne-naturalisma, reguleca, aŭtonoma lingvostukturo de Esperanto, alivorte kontraŭ la Fundamento.

Malbona ekzemplo en vortaro

Kompletan konfuzon kaŭzas la Etimologia Vortaro de la Propraj Nomoj de André Cherpillod (2005). Ĝis nun ĉiu bona vortaro montris klare la radikojn de landonomoj por ebligi regulan derivadon de la nocio por la landano. Ekzemple: „German/ujo, -io“ aŭ simile. Cherpillod forlasis tiun sistemon kaj indikas anstataŭe, ĉu landonomoj devenas de alia nomo. „Deveni“ ne signifas „esti regule derivata“! Ekzemple: Ĝusta prezento estus „Alĝerio/o“; nur tiam oni klare vidas, ke la landano estas Alĝeriano. Sed ĉar „Alĝerio“ kompreneble devenas de la nomo de la ĉefurbo Alĝero, Cherpillod skribas „Alĝer’io“. Tiel nun ne plu estas dedukteble, kiel nomiĝas la landano, kaj tio pliprogresigas la fenomenon, ke multaj Esperantistoj ne plu regas la landanonomojn.

Alvoko al la Esperantistoj

Por kontraŭagi tiun fatalan evoluon, mi jen alvokas ĉiujn respondecemajn redaktistojn kaj aŭtorojn, precipe tiujn de lernolibroj kaj vortaroj, uzi sisteme la sufikson -uj- por la koncerna grupo de landonomoj, kaj mi tre rekomendas tion ankaŭ al la ordinaj Esperantistoj, kiuj celas regi la nomojn de la landanoj. Esperanto estas altgrade regula kaj facila; „naturalisma“ evoluo iom post iom detruus ĝian unikan strukturon.

Rudolf Fischer